

James Yorkston,
Molly Malone

tradukita de Jean-Marc Le-clercq

En bela Dublino,
kie ravas la ino,
Ekvidis dolĉegan mi Molly
Malone.
Ŝi travagis stratarojn
puŝante la varojn.
"Kardioj! Mituloj! Aĉetu de
mi!"
Ho freŝajn kardiojn,
Ho vivajn mitulojn,
Moluskojn vivegajn proponas
mi!

Estis ŝi vendistino,
sed ne miris Dublino,
Ĉar ankaŭ tiel faris gepatroj
de ŝi.
Ili vagis stratarojn,
puŝante la varojn,
"Kardioj! Mituloj! Aĉetu de
mi!"
Ho freŝajn kardiojn,
Ho vivajn mitulojn,
Moluskojn vivegajn proponas
mi!

Jen febro ekfortis,
pro tio ŝi mortis,
La fino alvenis al Molly Malo-
ne.
Fantomo nun vagas,
neniu nun pagas
Por kardioj, miltuloj puŝataj
de ĝi.
Fantomajn kardiojn
Fantomajn mitulojn,
Fantomajn moluskojn nur
vendas nun ĝi.

...

James Yorkston,
Moliino Malon'

tradukita de Manfredo Ratislavo

1. En bela Dublino,
Jen vivis knabino,
Enamiĝis unue en tiun ĉi mi.
Ĉareton ŝovante
Tra l' stratoj irante
Ŝi vokis : Jen konkoj, jen ostroj!
Aĉetu vi, ho!
Ankoraŭ tutfreŝaj, ankoraŭ tut-
freŝaj!
Jen konkoj kaj ostroj! Aĉetu vi,
ho!

2. Veturis ŝi tiel
Tra l' stratoj samkiel
Ĝin faris antaŭe gepatroj de ŝi.
Ŝian ĉaron ŝovante,
Tra l' stratoj irante
Vokante : Jen konkoj, jen ostroj!
Aĉetu vi, ho!
Ankoraŭ tutfreŝaj, ankoraŭ tut-
freŝaj!
Jen konkoj kaj ostroj! Aĉetu vi,
ho!

3. Ŝi iĝis malsana,
Sanig' estis vana,
Memoras mi ĉiam ankoraŭ pri ŝi,
Tra l' stratoj iranta,
Ĉareton ŝovanta,
Vokanta: Jen konkoj, jen ostroj!
Aĉetu vi, ho!
Ankoraŭ tutfreŝaj, ankoraŭ tut-
freŝaj!
Jen konkoj kaj ostroj! Aĉetu vi,
ho!

...

James Yorkston,
Mol Ní Mhaoileoin

tradukita de Seán de Fréine

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio
estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis
tion.

...

*Traduko de la Angla poemo “Molly Malone” de James Yorkston en Esperanton de JEAN-MARC LECLERCQ (*1961-10-10).*

Arg-374-1886 (2013-11-25 11:01:43)

*Traduko de la Angla poemo “Molly Malone” de James Yorkston en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2006-12-04.*

MR-451-2 (Esperanto) / Arg-374-735 (2008-11-29 16:14:27)

Traduko de la Angla poemo “Molly Malone” de James Yorkston en la Irlandan de Seán de Fréine.

Arg-374-817 (2007-05-16 20:17:33)

Laŭ la irlanda kantlibro “Sing Along Linn” la tradukinto de tiu ĉi kanto estas Seán de Fréine, 36 Nutgrove Park, Cluain Sceach, Baile Atha Cliath 14, Irlando. Tel: 00353-(0)1-2694660 e-mail: defreine@iol.ie